




'Nova Urbo'

UNUECO TRANS ĈIUJ KULTUROJ

70-a datreveno

de Hiroŝima kaj Nagasaki



La nomo Nagasaki signifas "longa kabo" ĉar la urbo troviĝas komence de la golfo, kiun enfluas du riveroj: Urakami kaj Nakashima. La urbo estas triflanke ĉirkaŭita per montoj, kio limigis ĝian spacon ĝis 10 km² – ĉefe laŭ la du river-valoj. Malfermita golfo al maro, Nagasaki delonge utilas kiel grava haveno de la sud-japana insulo Kjuŝu, tial foje oni nomis ĝin "malfermita pordego" al ekstera mondo.

Tra tiu pordego en la 16a jarcento, kiam Nagasaki estis ankoraŭ malgranda vilaĝo de fiŝkaptistoj, venis ŝipoj el Portugalio kaj Nederlando. Tiel komenciĝis la unuaj kontaktoj inter Malproksima Oriento kaj Okcidento. La eŭropaj maristoj lernis pri la nova kulturo, aranĝis komercajn rilatojn kaj kreis kristanajn komunumojn. Novaj inventoj kaj ideoj eniris Japanion kaj estis unue realigitaj ĝuste en Nagasaki: arkitekturo (i.a. katedralo – tiam la plej granda en la orienta Azio), pavimitaj vojoj, telefonlinioj.

En jaro 1931, al Nagasaki veturis surŝipe Maksimiliano Kolbe kun kelkaj franciskanoj. Japanoj akceptis bonvole la gastojn kaj la episkopo indikis al ili lokon por konstrui la monaĥejon – sur la nelogiĝita deklivo de Hikosan-monto. De ĉi tiu momento komenciĝas la nekutimaj eventoj.

Nekonata historio pri Nagasaki

Kiam ili tien iris por ekvidi la donacitan lokon, la monto aspektis tre malkonvena por loĝi kaj des pli por konstrui ion ajn. La deklivo, surkreskita per sovaĝaj arbustoj, estis tute ne mastrumita kaj malfacile alirebla. La kunfratoj volis konvinki Maksimilianon ke oni trovu alian lokon, prefere en Urakami kie vivas 15 mil kristanoj. Maksimiliano respondis, ke *"obeemo alportas bonajn fruktojn, do ni ekloĝu sur la monto Hikosan"*. Li tamen ne volis neglekti la amikajn sugestojn kaj kuniris por vidi la kvartalon de Urakami. Kaj nun ni citas (eble ŝokan por multaj) ateston pri tiu vizito. Alveninte al Urakami, p. Maksimiliano ekvidis tiun lokon bela, sed diris: *"ni ne povas konstrui monaĥejon ĉiloke, ĉar post nelonge falos ĉi tie fajra globo kiu ĉion detruos"*.

La esprimo "fajra globo" aŭdiĝis tiam infanece fantazia, ja en jaro 1931 neniu eĉ imagis ke homoj konstruos atombombon. Fision (la proceso de nuklea fendiĝo) oni komencis esplori nur ok jarojn poste. Tial p. Kolbe, se havis vizon pri atoma atako je Nagasaki, ne povis uzi la nekonatan tiam vorton "atombombo" – parolis do nur pri "fajra globo".

En aŭgusto 1945 fakte aperis la fajra globo de 4500-kilogramama atombombo kiu mortigis 10 mil homojn dum apenaŭ kelkaj sekundoj. La cetera plimulto mortis poste en suferoj pro la posteksplosoda atom-radiado. Kie staris la urbo, restis nur amaso da ruboj. Kaj kio okazis en la monaĥejo konstruita sur la "maltaŭga" montoflanko? Hikosan ŝirmis ĝin kontraŭ la fajra blovego, nur vitroj rompiĝis en kelkaj fenestroj. Tiam oni rememoris la averton de p. Maksimiliano kaj post la milito aranĝis tie muzeon.



Unua ĉambro, en kiu ekloĝis p. Maksimiliano. Nuntempe ĝi estas parto de la muzeo en Nagasaki.

Maksimiliano Kolbe ne ĝisvivis al tiu jaro, li revenis al Eŭropo en 1936 kaj komence de la 2a mondmilito estis arestita de Gestapo (sekreta polico de Germanio). Aŭguste 1941, la germana gardisto murdis lin en Auschwitz-koncentrejo. Post 30 jaroj Maksimiliano Kolbe estis proklamita martiro kaj patrono por malfacilaj tempoj. En siaj leteroj p.Maksimiliano favore sin esprimis pri Esperanto kaj bondeziris ke nia Internacia Lingvo disvastiĝu. Unu el liaj periodaĵoj aperis i.a. en Esperanto. Pro tio li estis ankaŭ rekonita kiel patrono de la esperantistoj.

En majo 1945 finiĝis la 2a mondmilito en Eŭropo, sed ne en Azio. Tri monatojn poste ekbrulis Hiroŝimo kaj la 9an de aŭgusto al Nagasaki flugis la dua granda aviadilo B-29. Al ĝia piloto, la Urakami-katedralo montriĝis tre taŭga "orientiga punkto" por ĵeti la bombon. La eksplodo okazis 500 metrojn super la urbo, tial fajro kaj la nuklea blovego efikis plej terure.

Tuj post atoma eksplodo, la aero atingas temperaturon de 2000-3000 °C (ĝis 3 mil gradojn de Celsius), dume en "nura" 200 °C vaporiĝas pulmoj dum enspiro. La ondo de varmega aero frapas kun rapideco de ĉ. 350 m/sek, sub la premo de 420 kPa (kilopaskaloj).




Ni komparu, kio okazas en malpli alta premo:

Aer-premo	Kion ĝi kaŭzas
20 kPa	Damaĝas brikmurojn, frakasas fenestrojn kaj vundas aŭd-organojn
70 kPa	Nekuraceble difektas koron kaj pulmojn
140 kPa	Rompiĝas piedoj
280 kPa	Kapo krevas

Tio signifas, ke post atoma bombado neniu povas travivi en radiuso de unu kilometro kaj neniu estas sekura en 15-kilometra distanco. Sed ni memoru, ke nuntempe la A-bomboj estas multoble pli danĝeraj ol tiuj uzitaj fine de la mondmilito.

Esperanto-Libro



Pri la faligo de atombombo sur Nagasaki, aperis libro *En la nubon si sorbiĝis for!* kiun kompilis Grupo de Atombombitaj Instruistoj kaj helpis ĝin eldoni Komitato de Porpaca Edukado en Nagasaki. E-tradukon el la japana faris kaj eldonis Kjuŝua Esperanto-Ligo (en jaro 1973).

*

Antaŭ tri monatoj, inter la 3a kaj 28a de majo 2015, okazis UN-konferenco pri nedisvastigo de nukleaj armiloj. Oni anoncis, ke nuntempe jenaj ŝtatoj posedas atombombojn:

Usono – 4764	Francio – 300	Pakistano – 120
Rusio – 4300	Chinio – 250	Hindujo – 110
	Britujo – 225	Israelo – 80
		Norda Koreujo – 10

Kvar registaroj ne subskribis la Traktaton de Nuklea Nemultigo: tri el Azio (Hindujo, Pakistano, Israelo) kaj unu el Afriko (Sudano).

Post-atoma memorigaĵo

En gazetaro aperis tutmonde artikoloj pri la du bombitaj urboj. Inter publikitaj fotoj pri la bruligitaj viktimoj, precipe unu diferencis. Tio estis parto de la figuro de s-ta Maria el Urakami-katedralo. La deblovita kapo, anstataŭ okulojn, havis nur du nigrajn truojn, rezulte de la fajro post-eksploda.



La kapo estis trovita en amaso de faligitaj muroj. Poste oni nomis ĝin "Madono de Nagasaki". En la ĉefsidejo de UNO (Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj) estis organizita prestiĝa konferenco pri Nuklea Nemultigo kaj Haltigo Disvastigi Armilojn de Amasa Detruo.

La konferenco okazis en majo 2010, kun partopreno de multaj ŝtatoj kaj internaciaj organizaĵoj. Samtempe oni tie aranĝis ekspozicion, kies grava elemento estis la "Madono de Nagasaki" sendita el Japanio. La vizitantoj estis ŝokitaj vidante la duon-bruligitan kapon, kiu avertas ke dum atoma eksplodo neniu valora objekto povas esti protektita.

En Svislando ekestis fondumo kiu celas registrigi ĉi tiun impresan memorajaĵon en la UNESKO-listo de objektoj precipe valoraj (angle: *World Heritage List* / france: *Liste du patrimoine mondial*). Tiuj trezoroj de la monda heredaĵo devus esti internacie protektataj.

Sonoriloj de Nagasaki

En jaro 1959 la katedralo, kiel grava historia objekto, estis komplete rekonstruita en siaj originalaj loko kaj formo. Parton de la detruita muro oni transportis al Nagasaki-Parko de Paco. La ceteraj restaĵoj estas prezervitaj kiel monumento kontraŭmilita kaj sekve translokitaj al Nagasaki-Muzeo pri Atombombo. Inter la kelkaj, ne tute damaĝitaj milite objektoj, restis sonorilego de la katedrala sonorilo-turo. Eble tiu sonorilo inspiris junan kuraciston Takashi Nagai (1908-1951) al verkado de libro "Sonoriloj de Nagasaki". La libro priskribas spertojn de la homoj, kiuj travivis la atom-eksplodon en Nagasaki kaj en ĝi la leganto trovas ĉi tiujn skue belajn vortojn:

" Ekde monatoj post la katastrofo, ĉi tiuj sonoriloj ne plu sonoras. Neniam plu venu la tempo de mutaj sonoriloj! Por disvastigi la mesaĝon pri paco, ili sonu laŭte – ĝis fino de la mondo..."

Takashi Nagai renkontis kelkfoje p. Maksimilian Kolbe en la 1930aj jaroj kaj poste spertis mem eksplod-efikojn de la atombombo, sed tio ne estis ankoraŭ fino de lia malfeliĉo. Du tagojn poste, la 11-an de aŭgusto li revenis al sia familia domo, trovis ĝin detruita kaj interne – sian amatan edzinon Midori, morta. Kvankam vundita mem, d-ro Nagai senlace laboris en la detruita urbo portante helpon al homoj neimageble suferantaj.

Per sia propra mono de 50 mil enoj, en 1948 d-ro Nagai plantigis mil kelkjarajn ĉeriz-arbojn en la bruligita kvartalo Urakami por ĝin transformi je la "Altaĵo de Floroj". Eĉ se dum jardekoj oni devis anstataŭigi multajn elinter ili, la deklivo estas plue nomata "Nagai Senbonsakura" (1000 ĉeriz-arboj de d-ro Nagai).

Sekvajare oni publikigis la supre menciitan libron *Sonoriloj de Nagasaki* kiun Nagai verkis jam por la unua datreveno de la atoma frapego. Komence li ne povis trovi eldoniston sed tuj post la aperigo, tiu verko iĝis ege populara. Surbaze de ĝi, en 1950 oni faris filmon kun la sama titolo. Ambaŭ verkoj kortuŝe prezentas sorton de la homoj – viktimoj de la neniam antaŭe konata tragedio, kreita ne de ili. La kreskanta populareco ne povis jam helpi al Nagai kiu malsanis je leŭkemio (sango-kancero) kaj baldaŭ mortis. Takashi Nagai postlasis eseojn, skizojn kaj desegnaĵojn pri diversaj temoj: medicino, milito, morto, orfaneco, Dio, skribarto ... Tiuj verkaĵoj havis multajn legantojn kaj kontribuis al morala restarigo de Japanio.



Japanlingva afiŝo pri "Sonoriloj de Nagasaki"

En la proksima aŭtuno 2015, brita film-laborejo finos biografian aktorfilmon pri d-ro Nagai, liaj familio kaj urbo. Ĝia titolo estas, laŭ libera traduko: "Nur tio restas" (originale – *All that remains*). Komence de la nuna jarcento en Nagasaki estis malfermita "Internacia Medicina Centrejo de Takashi Nagai".



La "Nagai Senbonsakura" (ĉerizarboj de d-ro Nagai) ankoraŭ kreskas kaj ornamas kvartalon Ukarami kiu antaŭ 70 jaroj estis ŝanĝita je la senviva dezerto. Per sia florado, tiuj arboj defias la morton kaj ĉiuprintempe memorigas ke Nagasaki vivas, renaskiĝinta el la cindroj.

*

Entute, ĉ. 20 milionoj da azianoj perdis la vivon inter la jaroj 1937-1945. Tio estis plej ofte sendefendaj civiluloj el Ĉinujo, Koreujo, Filipina Insularo, Indonezio kaj el landoj de Hinduĉina Duoninsulo (Birmo, Laoso, Kamboĝo kaj Vietnamio). En historiaj verkoj, tiun grandegan tragedion oni foje nomas "azia holokaŭsto". Aldoniĝas tie ĉi ankaŭ pli ol 200 mil soldatoj el Usono, Britujo kaj Aŭstralio – mortintaj dum la bataloj. Japanio perdis 2.3 milionojn da soldatoj kaj ĉ. 620 000 da civilaj personoj (viktimoj de la du atombomboj). Kaj malgraŭ ĉio, depost la 1945a jaro milionoj mortis kaj dekmiloj eĉ nuntempe mortas plu en diversaj milit-konfliktoj.

Fortoj de la vivo

Ora fadeno

Niaj infanoj ĵus finis mezlernejon kiam mia edzo serioze malsaniĝis. Tion antaŭe neniu povis imagi, ĉar Mikaelo ĉiam ŝajnis esti forta kiel roko. La turmentan vojon komencis multaj operacioj en hospitalo, kio tre malfortigis lin. Neniu povis helpi kaj sola nia espero restis en Dio. Mikaelo kaj mi devis prepariĝi por la adiaŭo ĉar la fina disiĝo povis okazi ĉiumomente. En aparte doloriga horo, kiam ni pensis ke la malsano jam lin mortigas, Mikaelo kuraĝigis min: „*Vi estas mirinda virino. Niaj infanoj feliĉas havi tian patrinon*”. Kaj redonante al mi sian edziĝan ringon, li aldonis: „*Mi amas vin, mi ĉiam vin amos. Kiam ne plu mi estos sur la tero, mi helpos vin eĉ pli.*” Mikaelo mortis kaj mi sentas, ke li prenis nin kun si. Ni sentas lian ĉeeston hejme tiel forte, kiel neniam antaŭe. La ora fadeno ligas ĉielon kun la tero.

L.S. (Italio)


Ĉareto



Malriĉa homo frapis je nia pordo multfoje kaj petis ke ni donu monon al li. Mi ekpensis, ke anstataŭ doni al li fiŝoj, estus pli bone instrui lin kiel kapti pli da fiŝoj. Do mi komencis konstrui ĉareton per kiu li povos vendi kafon kaj doĵĉaĵojn. Uzinte nian malnovan metalan tablon, mi faris la kadron kun montro-fenestreto. Sekve mi aĉetis radojn, kiujn mi instalas sub la planko. La malgranda vendo-ĉaro aspektis tute bela kaj taŭga por sia celo. Ni veturis al Bogota urbejo, kie vivis tiu homo kaj transdonis al li la movigeblan “vendejon”. Ekvidante ĝin, li ege surpiziĝis. Kaj nia mirigita feliĉulo petis ke ni faru komunan foton kun lia “komerca veturilo”. Li tuj eklaboris kaj komencis la novan, pli dignan vivon.

O.M. (Kolumbio)

Semajno por Unuiĝanta Mondo (SpUM, parto 2)



Brazilo: Aktivaĵoj en Curitiba fokusis je kreado de amikaj rilatoj inter infanoj, junularo kaj plenkreskuloj. Unue la partoprenantoj lernis pri la arto dialogi en diversaj situacioj. Ne estas ja facile praktiki ĝin en reala vivo. Lasta akcento de la aranĝo estis kreado de "tsuru" – (gruo, scienca nomo: *Grus japonensis**) el foldita papero laŭ origamio, populara japana arto. En orienta kulturo, la *tsuru* alportas esperon pri paco, unueco kaj feliĉo. Tial ĉiu juna homo lernas fari sian propran paper-gruon. En dimanĉa vespero la gejunuloj praktike esprimis sian amikecon, helpante distribui varman supon kaj aliajn manĝaĵojn por senhejmuloj.



* Ruĝverta gruo (*Grus japonensis*) estas birdo ĉ. 1.5m alta – plejparte pure blanka kun la verto nude ruĝa kaj longaj flugiloj, nigraj sur ekstremo. Tiu eleganta birdo estas konata pro siaj graciaj paŝoj kaj bela dancado. Entute en la mondo vivas malpli ol 3,000 gruoj, ĉefe en akvoriĉaj marĉoj de Nordorienta Azio. La ruĝvertaj gruoj vivas monogamie, la paro kunvivas dum la tuta vivo kaj pro tio ili estas ankaŭ la simbolo de fideleco.

Paragvajo: Gejunuloj vizitis antaŭlernejon por gaje pasigi tempon kun la infanoj kaj poste, en hospitalo, akompanis maljunajn patientojn. Samtage la membroj de JpUM proponis volontulan donacon de sango al homoj kiuj ĝin bezonas dum operacio. La 10an de majo, la Semajnon fermis oficiale dimanĉa vetkuro en Caazapa, al kiu venis ankaŭ grupoj el aliaj urboj.

Argentino

Salta:

Junulara grupo venis al resanigejo Fazenda Esperanza kaj aranĝis tie "sportan posttagmezon" al junaj patientoj.



Punta Alta:

"Hamburgero ne estas por ni simbolo de unueca mondo"



– diris la gejunuloj kaj invitis siajn samaĝulojn al subĉielaj ludoj, kantado. Poste ili ĉiuj purigis parton de tiu kvartalo. Multaj deklaris partopreni la saman eventon en la sekvonta jaro.

En Mendoza, la gejunuloj el JpUM (en kunlaboro kun la movado "Mano por Paco") aranĝis kuron, marŝon kaj bicikladon je la distancoj de 2 kaj de 5 kilometroj. Ili kolektis manĝaĵojn, librojn kaj diversajn ilojn por lernado kaj ĉion transdonis al institucioj kiuj helpas malriĉajn familiojn.

Chaco: "Ŝanĝu la vizaĝon" – tiel titolitan aranĝon komencis gejunuloj per invito al diversaj ludoj. La unua paŝo por paco estas simple amikeca rideto, kiun ja ĉiu kapablas donaci, ĉu ne? Ili faris ankaŭ komunan mur-pentraĵon kaj sin fotis grupe antaŭ la muro kun skribaĵo "Mi laboras por paco". Samtage ili kontaktis alilandan junularon.

Buenos Aires: JpUM organizis artistan vesperon kaj foto-ekspozicion, kies plej bonaj bildoj estis rete publikigitaj. Samtempe okazis foiro de libroj kaj vestaĵoj. Oni povis aĉeti ankaŭ la surloke presitan T-ĉemizon. La tuton akompanis danciga muziko, klaŭnoj, bufedo kun kukoj kaj aliaj dolĉaĵoj.



Belarusio

Semajno por Unuiĝanta Mondo okazas – jam ekde kelkaj jaroj – ankaŭ en Belarusio, kun partopreno de junulara grupo el Pollando. Kiel kutime, la geknaboj vizitis hospitalon por infanoj, al kiuj ili alportis donacojn. Post du tagoj ili veturis ankaŭ al aliaj urbetoj. Bonŝance, la veturado por ĉiuj turistoj estis malmulte kosta ĉar en la sama tempo oni organizis tie tutlandan hokean konkurson. Sube troviĝas fragmentaj rememoroj pri tiu vojaĝo:



Unuaj du tagojn ni pasigis en la ĉefurbo Minsk. Sekve ni veturis okcidenten kaj en la urbeto Ivianec vizitis domon por etaj handikapuloj. Malgraŭ sia fizika malforto, la infanoj estas sanaj anime. Ni povis ekvidi, ke tiuj etuloj ĉiam radias serene kaj senhezite helpas unu la alian, kvankam ne estas facile moviĝi al ili. Tio estis tre bona leciono ankaŭ por ni, plenkreskuloj. (..) Alveturinte al urbo Lahoviĉe, ni kontaktis la junularon kaj kune preparis artan programon kun kantado kaj dancoj. Sekva loko de nia veturo estis domo por maljunaj homoj en Logišin. Ili tie konas nin bone, ĉar tio estis jam tria nia vizito. La direktoro dankis nin por la danc-muzika prezentaĵo kaj invitis al tre bongusta tagmanĝo.

Nia vojaĝo tra Belasusio estis agrabla kaj forta travivaĵo, tial ni ĝojas pro la decido veturi tien. Ni lernis multe pri tiu lando kaj ties loĝantoj. Multaj vivas simple, trankvile kaj estas feliĉaj. La renkontiĝoj estis tre emociaj, precipe en la porinfana hospitalo.

Ankaŭ en la domo por maljunaj homoj (..) mi sentis kvazaŭ vizitante mian propran avinon. Niaj lingvoj estas tre similaj, kvankam foje okazis ke ni ne tute povis kompreni pri kio ili parolas. Tamen iliaj vizaĝoj montris multe, tia estas la senparola "lingvo de la koro". (..) Ni estis ĉie varme gastigitaj kaj rimarkindas, ke belarusa junularo montriĝis tre simpatia kaj amikeca.



Komence de septembro, en Portugalio estos organizita mult-profesia Somera Lernejo pri Medicino, sub la titolo **"Nuntempo kaj Estonteco de San-sistemoj"**. La kursojn partoprenos diversaj specialistoj, studentoj kaj junaj profesiuloj en biomedicina sfero kaj tie oni uzos la kvar laborlingvojn: portugala, angla, itala kaj hispana. Se inter esperantistoj vi konas iun 20-35 jaraĝan kuraciston, flegistinon, terapiiston k.t.p. - vi povas transdoni ĉi tiun informon. Por la interesitoj, oni disponigas pli detalajn informojn ĉe: <http://www.mdc-net.org/en>.



*

Città Nuova /New City estas eldonata de Internacia Fokolar-Centro en Italio kaj en multaj aliaj lingvoj /landoj: ARGENTINO – Ciudad Nueva; AŬSTRALIO – New City; BELGIO - Nieuwe Stad; BRAZILO - Cidade Nova; BRITUJO - New City; BULGARIO - Nov Svjat; ĈILIO – Ciudad Neava; ĈINIO (Hongkongo) - San Sin Seung; DANLANDO - Ny Stad; **ESPERANTUJO** - Nova Urbo; FILIPINOJ - New City; FRANCUJO - Nouvelle Cite; GERMANIO - Neue Stadt; HISPANIO - Ciudad Nueva /Ciutat Nova (en kataluna lingvo); HUNGARIO - Uj Varos; JAPANIO - Uno; KANADO - Nouvelle Cite; KENIO - New City /Nouvelle Cite; KOLUMBIO - Ciudad Nueva; KOREUJO - Kumul; KROATIO - Novi Svijet; LIBANUJO – Citte Nouvelle; NEDERLANDO - Nieuwe Stad; OCEANIO - New City; POLLANDO - Nowe Miasto; PORTUGALIO - Cidade Nova; RUMANIO - Oras Nov; SLOVAKIO - Nove Mesto; SLOVENIO - Novi Svet; SVEDIO - Enald Varld; SVISLANDO - Citta Nuova; URUGVAJO - Ciudad Nueva; USONO – Living City; VENEZUELO - Ciudad Nueva.